

# Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA FRATECO

DIREKTORO: NELSON PEREIRA DE SOUZA

ĈEFREDAKTORO: LÁSZLÓ ZINNER

JARABONO

Eksterlande — Cr\$ 30,00

BRAZILIO — Cr\$ 15,00

Aŭ 25 Respondokuponoj

RIO DE JANEIRO, AUGUSTO 1947

JARO I

Monata eldono

N.º 5

Redakcio kaj Administrejo  
R. das Marrecas, 19, 2.º and.  
Tel. 42-5731 — C.P. 3677  
Ekzemplero — Kr\$ 1,00

## La Esperantistoj devas instrui Esperanton

Sendube nia movado kreskas kaj floras, sed... nur Dio konas la malfacilaĵojn, kontraŭ kiuj batalas la laborantaj Esperantistoj. Ĝia nombro devas plialtiĝi. Nia movado bezonas ĉiam novajn kaj viglajn laborantojn. Sed por pligrandigi la nombron de laborantoj estas bezone ke ni faru kursojn, novajn kursojn, pluajn kursojn. Estas multaj internaciaj movadoj, kiuj ankoraŭ ne uzas Esperanton, en nia urbo. Samideanoj, kiuj rilatas tiajn movadojn devas laboradi por la akcepto de internacia lingvo, kaj ili mem faru la kurson. Kelkaj samideanoj jam sukcesis inaŭguri kursojn en gravaj asocioj, gravaj tutmondaj movadoj; sed ili devas daŭrigi kaj sinsekvigi tiujn kursojn, kaj ili ne povas fari aliajn.

Ĉu vi, kara samideano, estas fratigemulo, ĉu internaciulo, ĉu novmondano? Ĉu vi deziras laboradi vigle kaj entuziasme por la vera interfratiĝo de l' Homaro? Ĉu vi deziras kunlaboradi por la nova mondo, pli feliĉa kaj pli fratiga? Amo kaj Interfratiĝo nur ekzistos en la mondo tiam, kiam ni ĉiuj kunlaboros inteligente kaj serioze!

H. M.



## NOVA ESTRARO DE LA ESPERANTO-KLUBO ĈE K. A. J.

Sidantaj de dekstre maldekstren: F-ino Elza Travassos de Faria, D-ro A. da Cruz Bonfim, S-ro Nelson de Souza, S-ro Josefo Joels, S-ro Roberto das Neves, F-ino Maria Angélica de Oliveira; Starantaj: S-ro Miguel da Silva, S-ro José Cosenza, S-ro Raimundo Menezes, S-ro Geraldo Torres, S-ro Bruno Silvestre, S-ro Joaquim J. Mendes, S-ro Jaime de Araujo, kaj S-ro Othon Crespo Nunes.

## NOVA DIREKTORARO DE "RIO ESPERANTISTA"

Forpasis kvar monatoj de kiam Asocio Esperantista de Rio de Janeiro decidis transformi sian oficialan organon "Informilo" en monatan gazeton titolitan "Rio Esperantista". Certe ni ne rajtas dubi pri la bonaj intencoj de la ĵus eksigitaj direktoroj de "Rio Esperantista". Ili havis unu nuran celon antaŭ si: la plibonigon de la Movado, la dissemadon de nia komuna Idealo.

Sendube multaj personoj lernas Esperanton pro ĝia praktikebleco. Eĉ la idealistoj ĝin profitas, praktikante ĝin kiel internacian helpligvon. Tamen la plej granda parto de la esperantistoj iĝis fervoraj kaj sindonemaj pro ĝia riĉa enhavo idealista, kiu kunigas la homojn tra la tuta mondo, almenaŭ spirite.

Inter la batalantoj troviĝas ĉiuspecaj elementoj — kompetentaj, kaj mallertaj; modestaj, kaj vantemaj; zorgemaj, kaj neglekaj; sinceraj, kaj profitemaj — ili ĉiuj konstante laborantaj, ofte ne komprenante unu la alian, sed ĉiuj bala sama Idealo: ke Esperanto estu enkondukata oficiale en la lernejojn ke Esperanto iĝu tutmonda oficialaĵo!

Dum Esperanto estos neglektata kaj eĉ akceptata duonoficiale, la esperantistaro mem devas klopodi ĉiamaniere por ĝia propagando.

Ofte, oni eraras. Tiuj, kiuj eraras estas kritikataj; tiuj, kiuj kritikis ankaŭ eraras... Kun eraroj kaj kritikoj fariĝas la movado. Tamen oni devas forigi la kritikojn, kaj konsekvence, la erarojn... Se eble!... Almenaŭ oni sincere klopodu!

"Rio Esperantista" plenumas gravan taskon en Brazilo, ĉe la jam ekzistantaj lokaj gazetoj, kiel "Pernambuco Esperantista", "Esperantista Bahiano", "S. Paulo Esperantista" kaj "Nova Sento". La unuaj direktoroj trandonis la malfacilan taskon al la nunaj, kiuj faros ĉion eblan por la plibonigo de la enhavo kaj de la ĝenerala aspekto de la gazeto. Tamen oni ne esperu perfektecon — nur plibonigon!

## UM JORNAL

(Esperantices)


O. S. LOPES

Você, caro leitor, primeiro tomou em suas mãos este jornalzinho, olhou-o, abriu-o (desdobrando-o), passou-o em revista mui rapidamente, vendo-lhe as páginas, as colunas, os títulos dos artigos e viu, ainda, que uns escreveram em português e outros em esperanto — o idioma internacional-auxiliar-neutro. Mas, será que ao menos imaginou sobre os sacrifícios que foram feitos pelos idealistas dessa formidável idéia, a fim de que fosse mais uma vez dado a público esse mensário? Pensou nas dificuldades várias que tiveram de enfrentar e vencer, para que ele viesse ter às suas mãos? Sentiu, inclusive, nos senões que ele por certo apresenta (mesmo porque não há nada perfeito na Terra), e, teve VONTADE de prestar seu valioso auxílio à obra? Se sentiu, por que não se devotar, de acordo com as possibilidades, no afã de ajudar aqueles, poucos, que se dedicam ao RIO ESPERANTISTA, este veículo do Brasil para o Brasil e para o exterior do Brasil, onde é muito apreciado, conforme o Arquivo da A.E.R.J. o comprova?

Como prestar auxílio? É muito fácil: Além do quadro de cooperadores que a Associação tem, onde poderá inscrever-se, contribuindo com módica mensalidade, além da aquisição por Cr\$ 1,00 (ou mais) de exemplar do nosso jornalzinho, ele aceita pequenos e grandes anúncios, bem como artigos, em português e na língua auxiliar, criação do muito estimado sábio polonês Dr. L. L. Zamenhog.

Assim, há lugar no "movado" para todos os de "boa vontade".

"Pensamento e ação", leitor, "pela Fraternidade Universal"!



# NIAJ KULTURKUNVENOJ

En la tagoj 31<sup>a</sup> de Majo: 7<sup>a</sup>, 14<sup>a</sup>, 21<sup>a</sup>, kaj 28<sup>a</sup> de Junio; 5<sup>a</sup>, 12<sup>a</sup>, 19<sup>a</sup> kaj 26 de Julio, dum la kutimaj kulturkunvenoj gvidataj de s-ano Laszlo Zinner, okazis la jenaj paroladoj kaj laŭtlejoj:

S-ano Florestan Nogueira laŭtlejis "Rimarkinda Horloĝo"-n. Sylla Chaves deklamis sian verkon titolitan "La Scivolo". Pro ĝenerala peto de la ĉeestantoj, denove li deklamis sian tradukon de "La Voĉo de Afriko", konata verko de la plej fama brazila poeto, Castro Alves. — S-ano José Cosenza, pri esperantaj. Samideano C. N. Blaŝkof laŭtlejis sian studon pri "Fizika aspekto de Brazilo". Li proponis, ke la Asocio ĝin multobligu, samkiel "La Historio de Brazilo"-n. (Ĉi tiu lasta jam estas havebla ĉe la Asocio). S-ano Nelson de Souza paroladis pri la kunfandiĝo de I. E. L. kun U.E.A., kaj pri ties oficiala organo "Esperanto". S-ano Barbosa de Mello, nia deligenta kasisto (la kasistoj devas esti ĉiam agrablaj kaj ridetantaj personoj — se ne, neniu pagus la kotizon...) laŭtlejis sian tradukon de la portugallingva rakonto "La inkubo de Loiola". Ŝajnas al ni, ke s-ano Mello estas pli lerta kasisto ol tradukanto... Tamen, se li persistos je tradukado, li eble fariĝos pli lerta tradukanto ol kasisto! Sed la Asocio bezonas lertan kasiston... Kion do li faru?...

S-ano Délio P. de Souza faris sian kutiman raporton pri la tutmonda Esp. Movado. Por tiuj raportoj, li lerte elektas la ĵus ricevitajn novaĵojn aperintajn sur la multnombraj gazetoj ekzistantaj en la tuta mondo. S-ano Viana Peixoto (laŭ ni, Fiŝoto...) paroladis pri la fama verkisto Malba Tahan. Sekve li rakontis du judajn historietojn. D-ro Braz Cosenza laŭtlejis sian verkon "Kelkaj aspektoj de la milito". Bonega kontraŭmilita studado.

Je la dekkvina de Junio, dum la kulturkunveno s-ano Aldino de Freitas ĉeestis kun siaj 15 gelernantoj, por enkonduki ilin en la esp. movadon. Pro tiu, la kunveno havis festan aspekton.

F-ino Elza Travassos de Faria laŭtlejis sian verketon titolitan "Singultoj". Ŝiaj klopodoj ne estas vanaj, ĉiam pli kaj pli si perfektigas. S-ano Jaime Araujo, komencanta esperantisto, parolis pri la disvastiĝo de Esperanto.

S-ano Roberto das Neves, konata grafologo kaj esperantisto, faris longdaŭran paroladon pri grafologio. Ne es-

tas necese diri ke, pro lia granda profesia kapableco, lia parolado estis bonega! (Je la fino de la parolado li sincere konfesis ke, ĝi nun li ne kuragiĝis analizi sin mem!...)

S-ano Zinner vojaĝis al São Paulo, laŭ invito de la tieaj esperantistoj kaj amikoj. Konsekvence la kulturkunveno je la 21<sup>a</sup> de Junio estis gvidata de la prezidanto de la Asocio. Post lia reveno el São Paulo, s-ano Zinner faris longan paroladon pri la vojaĝo. Li estas ege bone impresita pri la ge esperantistoj de São Paulo kaj pri la tiea esperanta movado. Dum kunveno ĉe Esperanto Klubo de S. Paulo, li faris malgrandan paroladon pri la praktika uzado de Esperanto. Dum la sekvontaj tagoj, akompanate de la prezidanto de la Esperanto Klubo, s-ano Osvaldo Leite de Moraes, de f-inoj Amélia Levy, Norma Guerrini, Astrogilda Guerrini kaj de la direktoro de la propaganda fako, li vizitis la urbon kaj, propagandecel, ties ĵurnalojn. "A Gazeta" kaj "Diário de Notícias" publikigis longajn artikolojn pri la vizito kaj ĉefe pri Esperanto.

S-ano C. N. Blaŝkof laŭtlejis sian verkon pri la vivo de "Tiradentes". Kiel ĉiam, li sukcesis. Por plenumi ĝeneralan peton, s-ano Zinner paroladis pri la temo "De Klasikaj Artoj ĝis Futurismo". S-ano Délio P. de Souza memorigis la ĉeestantojn pri la XI Brazila Kongreso.

La kulturkunveno je la 12<sup>a</sup> de Julio estis dediĉata al rememoro pri la apero de la unua libro en Esperanto. Samideano José Cosenza paroladis pri la temo, kaj elokvente pruvis, ke li sukcese enkapigis la Historion de Esperanto... S-ano Wilton Ribeiro laŭtlejis sian verketon titolitan "Noktiĝo".

La kulturkunveno ricevis el Rafaela, Argentino, la jenan leteron senditan de la argentina s-ano Enio Hugo Garroto: "Mi sciigis per "Rio Esperantista", ke vi akceptas kunlaboraĵojn por viaj kunvenoj. Nu, mi ĉi kune sendas du verketojn, kiuj eble plaĉos al vi..." — S-ano Zinner laŭtlejis la ricevitajn esperantaĵojn, kaj ni povas aserti al nia argentina s-ano, ke ili vere plaĉis al ni ĉiuj. Ni do petra lin, ke li daŭre kunlaboru. La menciitaj verketoj, kiujn ni aperigos sur "Rio Esperantista", havas la jenajn titolojn: "Riĉeco devenanta el la argentinaj ebenaĵoj" (Ekonomia studo) kaj "Lojaleco de San Martin" (Anekdoto).

S-ano Peixoto laŭtlejis verkon sian pri la deveno de esperantaj vortoj. S-ano Blaŝkof legis sian tradukon de ruslingva originalo de Anton Ĉehov, kaj titolita "Pri malutilo de la tabako" (Monologo). F-ino Maria Angélica laŭtlejis bonegan tradukon sian pri "Sankta Francisko de Asiso".

Je la 26<sup>a</sup> de Julio nia sidejo estis vizitata de s-ano d-ro José Paulino Alves, ĵuĝisto en Anchieta (Ŝtato Espirito Santo). La prezentparoladon faris s-ino Cedilha Neto, kiu estis lia iama lernantino. La eminentan vizitanton salutis ankaŭ F. Dobblas Filho, nome de la Asocio; Nelson de Souza, nome de la Esperanto Klubo ĉe K. A. J., kaj L. Zinner, nome de la kunvenantoj. Fine, s-ano Paulino dankis la sinceran akcepton.

Je la fino de la kulturkunveno, kaj laŭ propono prezentita de s-ano Zinner en la antaŭa sabato, ĉiuj kunvenantoj kune kun la eminenta vizitanto efektivigis viziton al Federação Espirita, ĉe avenuo Passos, kie s-ano Aldino de Freitas gvidas kurson partoprenatan de 15 gelernantoj. Nia jam atendata vizito okazigis tie kvazaŭ festotagon. Novaj kaj malnovaj esperantistoj interbabiladis kontentaj, feliĉaj, kaj ĝoje sentante, ke ne estas vanaj niaj klopodoj por realigi la genian ideon de nia neforgesebla Zamenhof, kies belega Idealo tra la spaco kaj la tempo eniras en la koron de ĉiuj pacamantoj!

Venu do esperantistoj al niaj kulturkunvenoj! Ĉiujn sabatojn, je la 16,30 h., ĉe nia sidejo.

## S. PAULO ESPERANTISTA

Os nossos samideanos da vizinha capital de S. Paulo fundaram um órgão para propagação do ideal esperantista, cujo primeiro número recebemos com muito prazer. Aparecendo alguns meses antes do XI Congresso Brasileiro, que se realizará naquela cidade, no próximo mês de Setembro, prestará relevantes serviços ao preparo do mesmo e à propagação da língua auxiliar.

O jornal é bem impresso, com muitos "clichés", inclusive uma vista da bela capital do Estado bandeirante.

Esperamos que todos os samideanos do país apoiem tal iniciativa, que vem dar novo sangue e entusiasmo ao nosso movimento, num momento oportuno para se intensificar a p r o p a g a n d a em todo o mundo.

## ENLANDAJ INFORMOJ

PÓRTO ALEGRE — Ni ricevis la jenan sciigon: "Ni havas la honoron komuniki al vi la fondon, de l' Departamento de Esperanto de "Grêmio Estudantil Julio de Castilhos" en la kolegio samnoma de Pórtto Alegre. Ĉi tiu estas la unua esperantista asocio, kiu ekzistas nun inter la studentoj de Rio Grande do Sul. Ni havas jam kurson de Esperanto por la lernantoj, direktatan de D-ro Benjamin Camosata. Nia deziro estas havi bonan bibliotekon kaj fari grandan propagadon."

MANAUS — Estas fondita Grupo Esperantista Amazonas Verda Stelo, kiu funkcias ĉe "Legião Brasileira de Assistência", kies ĉambro estis ĝentile proponita de Desembargador André Vidal de Araujo. La unua estraro estas jena: Prezidanto Dr. Hugo Mario Tavares, Viceprezidanto Dr. Luiz Americo Nunes de Melo, Unua Sekretario Sebastião Augusto, Dua Sekretario Guanabara Gomes de Araujo, Kasisto Arthur de Melo Soares, Helpkasisto Flavio Fiuza da Camara, Bibliotekisto Ubiratan Lopes, Direktoro pri Propagando Moisés Bernardino Lindoso.

UBERLÂNDIA — En tiu urbo la samideano fondis Spiritisma Grupo Esperantista-n, kiu propagandos nian lingvon ĉe spiritismaj centroj, kaj samtempe estas ligitaj al Uberlândia Esperanta Klubo, kaj kunhelpas la ĝeneralan Esp-movadon.

## NOTOJ DE LA SEKRETARIO

Dum la monato Junio okazis tri kunsidoj: du ordinaraĵoj je la 2<sup>a</sup> kaj 16<sup>a</sup>, kaj unu eksterordinara je la 30<sup>a</sup>. La Estraro starigis Esperanto Inform-Servon, pri kiu prizorgos samideanoj Constantino N. Bachicoff, V. Guayanás de Souza, kaj D. Pereira de Souza. Oni decidis, ke la Kasisto skribu al ĉiu ano, kiu ŝuldas pli ol ses monatajn kotizojn, kaj petu la pagon, tial, ke ni povu fari urĝajn elspezojn.

— Dum la eksterordinara kunsido de la 30<sup>a</sup> de Junio, la estraro aprobis laŭdvoĉon al eksigo de la direktoro kaj de la sekretario de "Rio Esperantista", kiuj, pro personaj okupoj ne povos plu plenumi la laborojn por la gazeto. La estraro aprobis laŭdvoĉon al ili pro ilia laborado, laŭ propono de s-ano L. Zinner. Por anstataŭi ilin, la estraro elektis samideanojn Nelson Pereira de Souza kaj Laszlo Zinner, kiel direktoron kaj ĉefredaktoron.

— Dum la monato Julio okazis nur unu kunsido je la 7<sup>a</sup>, kiu decidis pri kelkaj aferoj; la 21an, pro malgranda nombro da direktoroj, ne okazis kunsido.

# ESPERANTO - KLUBO ĈE K.A.J.

La 2<sup>a</sup>n de Julio okazis la enoficiĝo de nova Estraro de la Esperanto-Klubo ĉe Kristana Asocio de Junuloj (YM CA), kaj ni prezentas nun la parola deton faritan tiukaze de ĝia nova prezidanto.

Sinjoro Prezidanto de razila Ligo Esperantista, Sinjoroj Estraranoj de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro kaj Brazila Klubo "Esperanto": Estimataj samideaninoj kaj samideanoj:

Je mi enoficiĝis en la prezidantecon de Esperanto-Klubo ĉe la Kristana Asocio de Junuloj en Rio de Janeiro, kaj certe vi ĉiuj atendas de mi, hodiaŭ, la prezentadon de agadplanoj kaj programo pri organizado kaj propagando de nia kara helplingvo, tamen mi ja ne promesas nun al vi la efektivigon de iu speciala projekto, ĉar mi tion ne havas; mi nur prezentos nun al vi, karaj gesamideanoj, kelkajn ekzistantajn faktojn kaj la respektivajn konkludojn, el kiuj mi per ĉiuj fortoj miaj klopodados pli kaj pli vigligi nian Klubon kaj sinsekve fari ĉion eblan por la konstanta progresado kaj nedetruibla harmonio en nia movado.

Gesamideanoj, ekzistas neniu Esperanta organizaĵo en Brazilo, havanta tiom da eblecoj, kiom nia Klubo; kaj en la tuta mondo eble estas tre malmultaj tiuj, kiuj same kiel ni staras en tiel bona situacio koncerne al facilajoj je kunveno, agadlibereco kaj apogo ĉe la protektanta asocio, k. c.

Mi vidas antaŭ nia Klubo du vojojn sekvtotajn paralele. de kiuj dependas ĝia vivo kaj progreso, kaj parte la progreso de Esperanto mem. La unua konsistas el konstanta kaj efika enkonduko de la

Zamenhofa kreitaĵo en la ĉiutagan vivon de Kristanaj Asocioj tra la tuta mondo; la duan ni plenumos pere de sindona kunlaborado kun ĉiuj brazilaj organizaĵoj esperantistaj kaj pere de pilgrandskala propagando de Esperanto.

Kristana Asocio de Junuloj ekzistas ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en preskaŭ ĉiuj landoj de la terĝlobo, ĝia organizado estas vere modela, ĝiaj celoj plene akordigas kun tiuj de la "interna ideo", tiom klare prezentitaj al ni de Zamenhof dum la Bulonj-sur-Mara kongreso:

"Ni inter popoloj la murojn detruos, Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero Ekregos sur tero."

Karaj gesamideanoj, je la jaro 1855, 32 jaroj antaŭ la apero de Esperanto, oni fendis em Parizo la Tutmondan Allancon de Kristana Asocioj de Junuloj; tamen estas bedaŭrinde, ke ĝis nun tiu Alianco ne sentis ankoraŭ la bezonon uzi inter la 10.000 asocioj la plej taŭgan internacilingvon. Tia ĝuste estas la laboro de nia Klubo; mi esperas, do, ke ĉiuj anoj bone komprenos ĝian gravecon, kaj ke ili ĉiuj sindone kunlaborados kun la ĵus elektita Estraro.

Ankoraŭ oni ne laboras en iu alia lando tiel efike kaj konstante, kiel en Brazilo, por la uzado de Esperanto en Kristanaj Asocioj de Junuloj. Ni ja esperu, ke el nia lando naskiĝos tiu uzado, kaj ke baldaŭ multaj aliaj same agados en diversaj landoj.

Antaŭen, do, karaj gesamideanoj! Al la laboro!

# ZAMENHOF

(Portugala originalo de ARMANDO COUTINHO DIAS)

Se mi posedus majstran versinspiron  
Mi verkus monumentan, gloran kanton,  
Por montri mian laŭdon kaj admiron  
Al la klerul' kreinta Esperanton.

Talenta kaj bonkora, tiu viro  
Por monda paco estis batalanto,  
Pro tio lin eterne kun sopiro  
Memoros ĉiu vera pacamanto.

Ripozu pace, kara Majstro nia;  
Aŭtor' de l' bela lingvo lumradia,  
El Amo kaj Boneco konstruita.

Meritas Zamenhof ja monumenton,  
Ĉar li dediĉis penon kaj talenton  
Al la Homar de lia kor amita!

Esperantigita de M. Aveleza de Sousa

# RICEVITAJ LETEROJ

"Rio Esperantista" ricevis leterojn de la jenaj gesinjoroj, al kiuj ni kore dankas:

S-ro René Estevam Deckers, Goiaz, de la Universitato de Bruxelles. Ary Zamora, Pôrto Alegre, inter alie skribis: Ricevinte la tre plaĉan kaj utilan gazeton "Rio E-ista", mi korege gratulas vin, samtempe dezirante al ĝi longdaŭran vivon por la kono de nia kara idealo!

S-ro Onesimo Faria, el Belo Horizonte, portugallingve, Banco Mercantil de Minas Gerais S. A. S-ro Wilson Veado kiu skribas: Mi havas la plezuron vin sciigi pri la alveno ĉe mi de la nova publikigaĵo "Rio E-ista", redaktata de vi, kiun mi kore dankas. Kun plezuro mi vidas "Informilon", la antaŭa multobligita organo oficiala de la Asocio, alpreni al si la nunan presitan aspekton, sub nova titolo, ĉar ĝi estas elokventa atesto pri la agameco de ĝia direktantaro.

S-ro Hermes Pitta, el Urbo Salvador, S-ro Casimiro Siedlecki, el Curitiba, S-ro Manoel Domingues de Sá Fortes, el Perdões, Ambassade de France au Brésil, l'attaché d'information, S-ro Edouard Legris, kiu portugallingve skribis la jenon: Agradeço-lhe a honrosa remessa do primeiro número do "Rio Esperantista", jornal em esperanto e português editado pela Associação que V. Sa. secretaria, cuja distribuição é feita a todos os seus membros, assim como aos clubes esperantistas de todo o mundo.

Não deixarei de lhe enviar logo que se me ofereça oportunidade, material de interesse universal por cuja inclusão

na revista em apreço lhe reiterno meu reconhecimento. O objetivo esperantista coincide com o permanente ideal de confraternização em favor do qual a consciência democrática do mundo nunca deixará de se empenhar...

F-ino LACYR SCHETTINO, el Barra Mansa, inter alie skribis: Mi elkore gratulas vin pro la aperigo de R. E-ista". Fruktodonan vivon, mi al ĝi deziras.

S-ano Moacyr S. Cunha, el Recife skribas: Elkore mi gratulas vin pro la bona sukceso, kiu evidentiĝas la entuziasmon kaj la laborkapablecon de la tiea samideanaro. Bedaŭrinde, nia movado ĉi tie estas malforta. Sed tio ne gravas. Dum unuj dormetas, aliaj agadas: Dank'al Dio!

S-ro Francisco S. G. Schadden, el São Bonifácio, inter alie skribas: Mi deziras al ĝi grandan sukceson, kaj esperas ke ĝi aperos pli regule ol niaj aliaj brazilaj esperanto-revuoj...

S-ano Adair Perez de Carvalho, el Urerolândia, S-ano O. S. Carvalho, el Santos, F-ino Carmen Ribeiro, el Bahia, Grêmio Espirita Nazareno, el Rio de Janeiro, S-ro Elidio Taveiros, el Rio Claro.

Fine, du telegramoj ambaŭ el Rio de Janeiro. Jen la teksto de la unua: Ĵus ricevinte ekzempleron via nova organo mi plenumas la devon danki vin pro ties sendo BRAZILA LIGO ESPERANTISTA. La dua: Considerando Rio Esperantista iniciativa de grande valor cultural para o Esperanto cumprimenta sinceramente IRACEMA ALVARES COELHO.

## RESUMITAJ HISTORIAJ INFORMOJ PRI BRAZILO

MULTOBLIGITA KAJ DISDONATA DE

Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

Postkesto 3677 — Rio de Janeiro — Brazilo

kontraŭ poŝtmarko Cr\$ 0,40 enlande

kaj 1 respondkupono eksterlande

## LETERPAPERAJ KAJ KOVERTOJ

Asocio disvendas leterpaperon, kun verda stelo kaj jenaj vortoj: LINGVO INTERNACIA — Sendinto..... Adreso.....

Prezo: 100 Cr\$ 18,00 — 50 Cr\$ 10,00 — 10 Cr\$ 2,00.

Kovertoj kun verda stelo kaj suba frazo: "O Esperanto é a lingua internacional, auxiliar e neutra que facilita as relações entre os povos." Samaj prezoj.

Samideanoj el internlanto bonvole sendi pli Cr\$ 1,00 pro afranko.

# EN ANTIKVA HINA TEMPLO

C. N. BLAŠIKOF

En la orienthina provinco Ŝan-Tung, pli malpli meze de la fervojo kunliganta Tjan-Tzin kun Ŝan-Ĥaj, staras la urbeto Ta-Jan-Fu kie al mi okazis pasigi ses monatojn en la jaro 1921-a.

Ĝi estas tipa urbeto de la Ĥina internlando: stacidomo kun garnizonaĵa kazerno apud ĝi, malmultaj vendejoj kaj modestaj hejmkonstruaĵoj, nenan eksterordinaran signon montranta al la vizitanto.

Sed kiam oni forlasas la urbeton sekvante la vojon, kiu kondukas al malproksimaj montoj (tiu vojo estas ŝtonpavimita de la urbeto ĝis la lasta monaĥejo perdita inter la montoj), oni post duonhora marŝado ekvidas la pagodojn.

La unua el ili elstaras maldekstre kaj supere de la vojo kun sia enirejo en ŝtonaj muregoj. Oni eniras kaj, suprenirante dekstren laŭ la ŝtona ŝtuparo, subite sin trovas antaŭ la fasado de l' pagodo kiu konsistas el du longaj kaj mallargaj ŝtonaj kaj brikaĵoj konstruaĵoj. Antaŭ ĝia maldekstra alo estas granda korto meze de kiu staras ŝtonaltaro por bruloferoj, kiujn ĉe Ĥinoj oni faras per bruligo de la or-kaj arĝentkoloraj paperecetojn kiuj simboligas donacojn kaj monferojn al dioj.

Plue, post la korto, forstregiĝas kampoj de dolĉterpomoj kaj arakidoj, kiujn la rusoj nomas Ĥinnuksoj.

Ĉi tiu alo de la konstruaĵo enhavas salonegon je tridek kelkaj metroj longan kaj je dekkvin metroj larĝan, probable destinita al la celebradoj de la ritaj ceremonioj, kies antaŭa parto ne havas muron kaj per tia maniero permesas vidi la bruligaltaron. Sur la kolonoj subtenantaj la tegmenton pendigas longaj, mallargaj, nigraj lignaj tabuloj portantaj orkolorajn hieroglifojn.

En tiu ĉi loko oni enspiras antikvodoron de la jarcentoj, oni kvietigis kaj inklinigis al la meditado...

Malantaŭ ĉi tiu parto de la konstruaĵo estas ĝa korto, pli malgranda, kiu disigas la salonegon de alia konstruaĵo. La dua konstruaĵo estas pli malgranda ol la unua kaj laŭ aspekto estas loĝejo de la bonzoj, kvankam mi ne povas certigi tion ĉar terura kaj jam malnova interĉivitana milito trabuligis tutan Ĥinujon en la epoko kiam mi vizitis da templon kaj la pago-

do, pri kiu mi parolas, estis tute forlastita de la bonzoj.

La dekstra alo de la ĉefa konstruaĵo enhavas ŝtonpavimitan korton (oni ne miru pri tiom da kortoj ĉar en Ĥinujo ĉiu hejma kaj templa konstruaĵo konsistas, ordinare, el interna korto kun unu aŭ du enirejoj, ĉirkaŭita de ĉambroj, salonoj kaj ceteraj ejoj), kiu tra ovalforma trapaso ĉe unu flanko de ŝtonmurego, alkondukas al la lasta, interna ejo de la templo.

La sanktejo estas alta kvadrata ŝtona konstruaĵo ĉirkaŭ kvin metroj larĝa, kvin metroj longa kaj preskaŭ tri metroj alta. Ĝia malsupra parto enhavas grandan niĉon kie, tra dikaj feraj kradoj, oni ekvidas pentritajn argilajn diojn. Suprenirante ŝtonan ŝtuparon (estas unu ĉe ĉiu flanko, dekstre kaj maldekstre) oni alvenas al ĝia supra etaĝo, kiu estas malgrandeta pagodo mem, konstruita sur la malantaŭa parto de la ĉefa kvadrata konstruaĵo kaj, pro tio elstaranta super ĉiuj aliaj konstruaĵoj, ĉar tiu ĉi templo ne havas turojn.

Ĉi tie oni ankaŭ vidas ŝtonan bruligaltaron, nigrajn tabulojn kaj, sub la tegmento de la pagodeto, aliajn argilajn diojn. Ili estas pli grandaj ol tiuj, kiuj sin trovas en niĉo malsupre. Kelkaj el ili havas terurigajn mienojn — ili estas genioj de la malbono, de la pasioj kaj de la malbonaj agoj. Aliaj surportas vizaĝojn kiuj esprimas mildecon kaj bonkorecon — ili estas genioj de la bono kaj de la plej altaj moralaj ecoj. Inter ili oni ekvidas dion kun sovaĝa mieno, en maldeca pozicio, kiu simboligas la Fekundecon, kaj diinon, kiu havas pli ol dek parojn da brakoj. Oni informis, ke tiu diino simboligas la Dankemecon sed tiuj aldona: Ni diras nur tion, kion ni aŭdis aliajn diri, kaj ni mem ne estas certaj pri tio.

Oni rigardas la altaron, argilajn potojn kaj vazojn en kiuj anaroj de la kredo forbruligadis maldikajn aromigajn bastonetojn faritajn el sekigitaj vegetaĵoj, oni enspiras strangan antikvan odoron kaj vole nevole ekpensas pri homa vivado.

Kiom da generacioj jam naskiĝis, vivadis, amadis, malamadis, suferadis, ĝojadis, vizitadis ĉi tiun templon serĉante la pacon de l' animo, la solvon de l' vivproblemoj,

kaj poste mizere aŭ glorie mortis! Oni preskaŭ sentas ilian ĉeeston, kvazaŭ ili plenis la forlasitan templon...

Vesperigis. La frothruado de la cikadoj plifortiĝas, preskaŭ surdigas nin. Oblikvaj, varmetaj sunradioj lumigas, sub la foliaro de grandaj belegaj arboj, muregon kiu ĉirkaŭas la tutan templon kaj malproksimajn siluetojn de kamparanoj kiuj prilaboras la kampon.

La malantaŭa parto de la templo lume desegniĝas sur la malproksimega fono de l' montĉenaro, blugita pro granda distanco. Tien kondukas la sama ŝtonpavimita vojo kiun oni farlasas enirante ĉi tiun antikvan templon.

Se oni persistas supreniri antaŭen, oni devas serĉi adekvatan veturilon kaj gvidistojn ĉar ekde tiu ĉi templo oni ordinare sekvas la ekskurson en portebla apogseĝo, portata ŝultre de kvar viroj kiuj estas samtempe gvidistoj. Nur tiamaniere oni povas viziti multajn aliajn templojn kaj sanktejojn, ĉiam suprenirante la vojon meze de la montoj.

Oni povas viziti pagodojn pli malgrandajn ol tiu ĉi, vidi multajn argilajn diojn inter kiuj estas kelkaj tiel grandaj kiel du aŭ tri viroj kaj kiuj movas la kordomembrojn: okulojn, brakojn aŭ kapojn. Kaj antaŭ ol eniri la lastan monaĥejon oni nepre ekvidos kelkajn bonzojn. Maljunaj, malgrasaj kaj riavepalaj, kun okuloj senbrilaj kaj manoj tremantaj ili vin renkontos ĉe enirejo, vin kondukos tra la tuta templo kaj fine mallauĉte kaj humile petos de vi almozdonaĵojn.

Dum la ekskurso oni okaze povas renkonti verajn karavanojn el pligrimoj kaj ankaŭ solajn piulojn. Kelkaj, laŭ diverskoloraj silkaj vestoj, kiujn ili uzas, estas riĉaj. Aliaj estas tre malriĉaj eĉ mizeruloj, kiel oni konjektas vidante iliajn eluziajn ŝifonajn vestaĵojn.

Jen, ekzemple, ekvidiĝas riĉa mandarena familio kun ĉiuj siaj domanoj transportata tra kruta interspaco de la vojo. Diverskoloraj slikaj pontolonoj kaj bluzoj de la virinoj kaj fraŭlinoj sekvas unu post alia kiel vivaj makuloj trafluantaj malrapide la

vojon. Vivaj kaj bonodorigaj floroj ornamas ŝiajn hararangojn. Ridindaj harplektejoj de la knaboj dancas ĉirkaŭ iliaj nukoj kaj sur iliaj dorsoj, la pentritaj vizaĝoj de la knabnetoj, ektimigitaj, kun duonmalfermitaj buŝoj, rigardaĉas nin.

Tuj poste sekvas tun ĉi karavanon tre maljuna virino suportanta eluzitan grizifonon pantolonon kaj forvelkitan bluan bluzon, aŭ pli precize, kiteleton. Kliniginta, ŝi paŝas kun granda malfacileco apogante sin sur longa bastono en sia dekstra mano. Ŝiaj piedoj, kripligitaj laŭ la antikva moro, ne povas fari longajn paŝojn kaj ŝi ŝajnas al ni tre laca.

Post iom da marŝado oni subite ekvidas, ĉe unu flanko de la vojo, pagodeton aŭ kapelon. Ĝi konsistas nur el ŝtonaltaro kovrita per multe da cindroj kaj kun kelkaj brulbastonetoj ankoraŭ brulantaj. Kelfoje, ĉe unu aŭ alia flanko de la vojo ekvidiĝas speco de restoracio kie oni povas mendi ian ajn manĝaĵon el porka viando kaj precipe tason da varmaga kaj tre aroma teo, kiun la restoraciisto elverŝas en nian tason el alta argila teujo.

Kaj la vojo sekvas antaŭen, sekvas ĉiam suprenirante la montojn. Ĝi ne estas glata kaj ebena; estas nur vico de nemultnombraj ŝtonŝtuparoj kunligantaj ŝiajn ebenajn interspacojn je distancoj kiuj multe varias. Por atingi la lokon, kie staras la lasta templo, kiu estas antikvega monaĥejo havanta la aĝon pli ol kvin jarcentoj, oni devas supreniri la tutan ŝtonpavimitan vojon enhavantan milojn da milojn da ŝtupoj.

Post kontentigi la sciavidon, post enspiri sufiĉe da antikvodoro, oni decidis reveni al la urbeto kaj komencas malsupreniri la pentrindan vojon.

Jen oni jam ekvidas la antikvan kaj grandan ŝtonan arkon kun tri trapasejoj kiu sin trovas meze de la vojo inter la urbeto kaj la unuaj temploj.

Ombroj jam ĉirkaŭas la objektojn kiam oni eniras la kurbigitan kaj mallarĝan ĉefan straton de la urbeto, kiam la lastaj sunradioj forvelkiĝas kaj malrapide forlasas la pintojn de la montĉenaro.

## PALACE MÓVEIS

Exposição permanente de Móveis de fino gosto.

P. M. RAWET & CIA. LTDA.

Praça das Nações, 184 - B ★ R. Cardoso Júnior, 506 - A  
Bonsucesso RIO DE JANEIRO Ramos

**SOCIALAJ NOTOJ**

**DÉLIO PEREIRA DE SOUZA** komunikas al siaj amikoj, kaj al tuta esperantistaro, la naskiĝon de sia tria fileto, je la 30<sup>a</sup> de junio, kiu ricevis la nomon Paŭlo.

**FRANCISCO DOBLAS FILHO** sciigas al ĉiuj gekorespondantoj sian novan adreson: Caixa Postal 3677 — Rio de Janeiro.

\*

Dum la nuna monato festas sian naskiĝan datrevenon la jenaj samideanoj:

- 1 — Francisca Telles
- 2 — Angelus Nascimento
- 2 — Milton Martins dos Santos
- 6 — Mário dos Santos Abrantes
- 7 — Edy Vieira Mendonça
- 9 — Maria de Abreu Jusi
- 10 — Manoel Fernandes da Silva Sobrinho
- 11 — Aldo Ottero Doblas
- 18 — Antonio Alipio Reis
- 20 — Braz Cosenza
- 21 — Paulo Gomes de Faro
- 24 — Ivone Dutra Martins
- 27 — Dinard José da Silva
- 31 — Claudemiro Franco dos Santos.

Al ĉiuj ili, niajn korajn gratulojn.



**NOVAJ GLUMARKOJ**

Ni ricevis serion de esp. propagandaj glumarkoj eldonitaj de s-ano R. das Neves. Diverskoloraj, kun kvin malsamaj desegnaĵoj kaj tekstoj, ili estas belaspektaj propagandiloj. Ĉiu folio konsistas el 50 glumarkoj. La desegnoj faritaj de s-ro Arcindo Madeira, elokvente pravas la artkapablecon de la menciita artisto, tiel pri formo, kiel pri kunigo de ideoj. El la diversaj ekzistantaj glumarkoj, tiuj ĉi ĵus eldonitaj estas eble la plej arte faritaj. Ni gratulas la artiston kaj la eldoninton.

Mendoj ĉe la Asocio, Poŝtkesto 3677, Rio de Janeiro. Prezo: unu folio Cr\$ 6,00; pli ol 10 folioj, nur Cr\$ 5,00 por ĉiu folio. Per la poŝto, plus Cr\$ 1,60.

**A. S. REZENDE**

— Inĝeniero —

Projektoj kaj antaŭkalkuloj por loĝdomoj luksaj, hoteloj, hospitaloj, lernejoj, kaj aliaj konstruaĵoj.

Informpetoj en lingvoj portugala, franca, angla kaj Esperanta

Adreso: Caixa Postal 2917

Rio de Janeiro — Brazilo

**IV<sup>a</sup> Argentina Kongreso de Esperanto**

Okazis de la 3<sup>a</sup> ĝis la 6<sup>a</sup> de Aprilo, en Buenos Aires, ĉefurbo de Argentino, la IV Kongreso de Esperanto. Re prezentis Brazila Ligo Esperantista-n, enlandajn klubojn kaj societojn, inkluzive Asocio Esperantista de Rio de Janeiro-n, nia samideano Ismael Gomes Braga. D-ro Mario Ritter Nunes reprezentis Brazilan Instituto de Geografio kaj Statistiko-n, kaj estis lia sekretariino samideanino Fina Maria da Luz Costa, kiu reprezentis Brazilan Klubon Esperanto-n kaj Esperanto Klubon ĉe K.A.J.

La 4an de Aprilo okazis "Viva Gazeto", programo konata de niaj samideanoj, ĉar ĝin prezentis S-ano Tibor Sekelj dum la Deka Brazilan Kongreso, kaj ĝin partoprenis S-ano Ismael Gomes Braga, kiu parolis pri "Esperanto kiel Idealo kaj instrumento por aliaj Idealoj".

S-ano Ismael revenis tre ĝoja, kaj tre entuziasma pri la tieaj samideanoj. La kongreso iĝis grava fratigilo inter sudamerikaj esperantistoj. Esperanto-movado progresas en tiu najbara lando, kaj iĝas pli vigla kaj entuziasma.

La unua kongreso argentina okazis je 1941, en urbo Rosario; la dua je 1943, en Buenos Aires; la tria je 1945 en Rosario. Intertempe okazis kunvenoj delegitoj: unua je 1942 en Córdoba; dua je 1944 en Mar del Plata; tria je 1946 en Córdoba. Ĉiujare almenaŭ la delegitoj kunvenis por trakti aferojn rilatajn al movado Esperantista.

Ni gratulas la argentinajn samideanojn pro ilia saĝa laborado kaj tre bona gvidado de nia movado.

**EKLUDO**

Verkis WILTON RIBEIRO

Multaj problemoj nune maltrankviligas la homaron! Inter la gravaj elpensoj kaj utilaj entreprenoj en la scienca kampo, la humanecaj ideoj perdas sian realismon, kaj materialismo heredas timigajn kaj indignigajn aspektojn. La monda luktado por siaj politikaj kaj ekonomiaj idealoj intense pligrandigas; forgesas la homo siajn deojn koncerne siajn simulojn kaj sin jetas al la neevitebla ĥaoso. Urgas, ke en ĉiuj sektoroj de la homaj aktivecoj eliĝu la defendantoj de la edifaj kaj sendifektaj idealoj. Por ke estu venkita la malbono, por ke sin liberigu la homaro de la difektoj, kiuj ĝin turmentas kaj konsternas, estas bezone ke la formulo de la racionalismo estu aplikata kun lerteco; ke la homo konvinku pri siaj spiritaĵoj kaj socialaj devoj kaj transpasu tiun malhelpon, kiu ĝin ekscitas kaj idiotigas. Tia problemo ne estas hodiaŭ. Tra la tempoj ĝi sin prezentis sub diversaj formoj kaj nuancoj. Ĉiuj mlitoj kaj ĉiuj malbonoj, kiuj turmentas la homaron ekaperis kaj maturigis siajn fruktonjn per tiu malvera kompreneco. Ili estas efikoj kies originoj, se ne batalataj ĝustatempe kaj energie, postlasos bedaŭrindan sulkaĵon de de spirita malklereco dum generacioj kaj genera cioj. La militoj, tiam, malebligis: niaj posteuloj naskiĝos for de la konfuza kaj tumulta atmosfero. La maljustecaj dornoj malfermiĝos kun tia furio, ke nia intelekto ne povas nun koncepti. Estos kvagaŭ generaciaj luktadoj por la posedo de la kaptajo; estos la luktado de la prudento kontraŭ la despotismo; la luktado de la senkulturaĵoj animoj, kiuj kvankam potencaj en la scienca kampo estos envolvataj de la spirita nescio. Tiam eble, la Dia fingro malaltiĝos, ĝis la malpia kaj malvirta homaro kaj ĉiuj voĉoj silentiĝos, ĉiuj suferoj kvietiĝos. Tial, pli ol neniam, konsiderante ke estas permesata al la homo la rezonado kaj la komuniaj

ideoj, necesas ke la probatantoj de la liberecoj laboru kiel neniam laboris, por ke tiu malbono estu superpasata, eĉ se, persekutataj de la malkreda popolo, ili ekcedos de laceco en la luktado. La peno de la komenco estas grava kaj ĉiuj kuraĝoj estos malgravaj antaŭ tio, kion oni devas fari. Ne estas necese por tio ke al ni aliĝu popolamasoj predikantaj, nek konsciencaj katekizantoj. Estas simplaj okazoj, tamen, kiuj estas gravurataj per egaj kaj grandaj markoj, la valoro de ĝiaj precizaj idealoj, okazoj kiuj, ornamataj per efikaj karakterizaĵoj etendas ĝiajn bonfarajn radiojn de paco kaj amo al la popoloj!

"Tuta cento da plej grandaj elpensoj ne faros en la vivo de la homaro tian grandan kaj bonfaran revolucion, kian faros la enkonduko de lingvo internacia." (Zame-nhof.)

\*

**RICEVITAJ PUBLIKIGAĴOJ**

Ni ricevis kaj dankas la jenajn:

**O Naturista**, organo de "Sociedade Naturista do Brasil", junio 1947.

**Laborista Esperantisto**, Amsterdamo, majo 1947.

**Heroldo de Esperanto**, numero 10 (1069), 15 majo 1947. **La Folio**, n.º 165, organo de Klubo Esperantista de Malmö, Svedujo.

**Reformador**, n.º 5, majo 1947, organo de "Federação Espirita Brasileira".

**Boletim Espirita**, n.º 13, junio 1947, enhavanta Esperanto-rubrikon.

**Amerika Esperantisto**, nroj. 1-4, Jan.-Apr. 1947.

**Nova Sento**, Uberlândia, Brazilo, n.º 2, junio 1947.

**O Espiritualista**, n.ºs. 32-33, majo 1947.

**S. Paulo Esperantista**, nroj. 1, 2-3, Aprilo, Majo-Junio 1947.

**Renovigo**, n.º 85, Majo 1947.

**Helena Esperantisto**, de Ateno, nroj. 142 kaj 143, Januaro-Februaro, kaj Marto-Aprilo 1947.

**Agência São Jorge**

(Agentejo Sankta Georgo)

Biletoj por vojaĝoj surmaraj, surteraj kaj aeraĵ

— TURISMO —

IMPORTADO KAJ EKSPORTADO

**JORGE SOARES & CIA. LTDA.**

PRAÇA MAUÁ N.º 67 — RIO DE JANEIRO, BRAZILO (ĉe la havenkajo)

## OPORTUNIDADES COMERCIAIS

**Karl Korschenhansen**  
Treppenstr., 8  
Wuppertal — Elberfedd  
British Zone — North Rhine  
— Alemanha.

— Deseja importar cereais, carne, gorduras, café, e outros produtos alimentícios.

**Gerhard Schulz**  
(23) Bremen St. Magnus  
Lesumen Heerstr. 34  
Am. Zone — Alemanha.

— Deseja importar fibras para a fabricação de escôvas e pincéis, principalmente piaçava da Bahia e Pará.

**Zwecker & Co.**  
Armgartstrasse, 14  
Hamburg, 24 — Alemanha.

— Deseja representar firmas brasileiras.

**S-ro. Joanff Cou**  
A. C. Chien Hwa Industrial Corporation  
104, Chung Cheng Rd., 10th Area  
Tientsin — China.

— Deseja importar máquinas, tecidos, açúcar, etc. Interessas e principalmente por açúcar.

**A. S. Niels Jensen**  
Flaesketorvet, 1  
Kobenhavn V — Dinamarca.

— Deseja importar e exportar mercadorias em geral.

## DONATIVOS

Além de muitas assinaturas, temos recebido donativos de samideanos, afim de auxiliar o jornal em sua fase inicial. Aos seguintes agradecemos sensibilizados:

Olívio Pinto, Manoel Esteves, Braz Cosenza, D<sup>a</sup>. Cedilha Cosenza, Plínio da Silva, M. Avelesa de Sousa, José Cosenza, Nelson de Souza, Srta. Elza T. Faria, Dr. Atalibio Sobrosa de Rezende, L. Zinner, num total de Cr\$ 937,30.

Agradecemos também a todos os samideanos que nos têm auxiliado na venda avulsa e aos que têm organizado listas de assinantes em outras cidades do país.

No Rio de Janeiro precisamos de muitos colaboradores para ampla difusão de nosso jornal. Os primeiros números foram colocados em 33 bancas no centro da cidade, e estamos agora interessados em ampliar a nossa rede de distribuição.

## PROFETAJO

Dezirante provi la konojn de astrologiisto prezentita, kiel kapabla plejdetale antaŭdiri la estonton, Henriko VIII lin demandis, kie li pasigos da kristnaskan tagon. Ne rimarkante, ke tiu demando enhavas insidon, li respondis:

— Mi ankoraŭ nenion scias pri tio, Reĝa Mosto.

— Ho! Ĉu ne?! Tamen mi scias — respondis la imperiestro — Vi ĝin pasigos en la Londona Turo!

Kaj li tuj kondukigis la astrologiiston en la karceron.

## DUBO

Antaŭ ol iri en vilaĝeton, iu pastro demandas knabon: — Kiu estas la plej mallonga vojo al la preĝejo?

La knabo sciigas lin tiamaniere: — Vi iru laŭ ĉi tiu strato ĝis la sesa, kaj poste maldekstren; tie vi ekvidos la preĝejon.

La pastro dankis al la knabo, kaj diris: — Dimanĉe vi iru al la preĝejo, kaj tie mi sciigos vin pri la ĉiela vojo. La knabo restis pensanta: la pastro ne konas eĉ la vojon al la preĝejo, kiamaniere li povos sciigi min pri la ĉiela vojo?!... Je tio mi ne kredas...

## Militista Hierarkio Kaj Civitana Devo

Oni rakontas, ke kolonelo-policestro, fama pro honesteco kaj devplenumo estis iam serĉata de generalo, kiu intencis peti indulgon por boparencosia, kies neregula vivo ne hramoniigis kun la punleĝaro. Sciiginta pri ties vizito, la poliestro dirigis per sia sekretario, ke li estas okupita. La generalo reiris. La saman respondon li ricevis. Kolera, li ordonis en la nomo de siaj galonoj, ke la kolonelo prezentigu. Plenumante sian militistan devon, la poliestro prezentigis, farante la devigatan saluton.

— Preta, mia generalo. Tiam la generalo klarigis la aferon, kiu lin estis iriginta tien. Pacience la kolonelo ĉion aŭdis, kaj ĉar li ne respondis per almenaŭ unu vorto, la generalo demandis. — Ĉu mi povas fidi vian aŭtoritaton? Ĉu mi povas esti certa pri la solvo? — Mian aŭtoritaton vi povas fidi, mia Generalo, sed ĉi tiu kazo apartenas al la poliestro, kaj li estas okupata.

Pripensu tion, ke la propono de nova abonanto montras la bonvolon de la samideanoj helpi la disvastigon de Esperanto kaj de ĝia interna ideo.

Tende sempre em vista que a proposta de um novo assinante revela o empenho dos samideanos em concorrer valiosamente para a difusão do Esperanto e da interna idéia, pela qual batalhamos.

## RIO-ESPERANTISTA

Propriedade da A.E.R.J.  
Um jornal do Rio para o mundo

Redação e administração:  
R. das Marrecas, 19 - 2.º and.  
Tel. 42-5731, - C. Postal 3677  
Rio de Janeiro — BRASIL

Diretor responsável  
Nelson Pereira de Sousa

Gerente  
Delio Pereira de Souza

Redator-Chefe  
Lászlo Zinner

Redatores  
Manuel Avelesa de Sousa  
Dr. Braz Cosenza

Auxiliares  
Othon Crespo Nunes  
José Cosenza

## EXPEDIENTE:

As importâncias referentes as assinaturas de RIO-ESPERANTISTA, deverão vir em nome do nosso gerente Delio Pereira de Souza, bem como, quaisquer quantia, Vale-Postal, cheques etc.

Este jornal dá ampla liberdade aos seus colaboradores, não se responsabilizando pelos conceitos emitidos em artigos assinados e implicitamente nas seções que tenham redatores responsáveis.

Organizaço je servo de UNIVERSALA FRATECO

La gazeto rajtigas tutan liberon al siaj kunlaborantoj kaj ĝi ne respondeas por la enmetitaj konceptoj en artikoloj subskribitaj kaj sekve, por la fakoj, kiuj havas respondecajn redaktorojn.

Estas permesata la represigo, ĉu parte, ĉu tute, de la artikoloj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

## BRAZILA EKSPORTADO DUM 1946

	Kiloj	Kruzejroj
Kafo-grano	930.274.860	6.441.462.506
Sukero	21.974.934	71.967.182
Kotonteksaĵo	14.102.848	707.021.075
Tolteksaĵoj	128.291	615.826
Tolstupaĵo	163.092	749.354
Aliaj stupaĵoj	6.000	49.789
Vegetajfibroj	23.644	445.582
Kanabofadeno	556	52.011

## CORREA DA SILVA FILHO & CIA. LTDA.

Ni akceptas reprezentadojn kaj disvendadojn  
Aceitamos representações e distribuições  
KRUDMATERIALO  
REPRESENTADOJ

RUA ANITA GARIBALDI, 281 — 4.º ANDAR — Cx. POSTAL: 4545 — TEL. 31246  
Endereço telegráfico «ALFRE SIL» — São Paulo — Brasil

## KURIOZA LETERO DE VICTOR HUGO

Esperantigis: M. AVELEZA DE SOUSA.

Letero sendita de la mondkonata franca verkisto al la itala grafo Victor A. Pepe, kaj publikita en la usona revuo "The Century", laŭ permeso de filino de la grafo. Ĝi ankaŭ aperis en la brazila revuo "Eu Sei Tudo" (Mi scias ĉion).

Hauteville, la 13an de Oktobro, 1862a.

Vi pravas, dirante ke mia libro "La Mizeruloj" estas verkita por ĉiuj popoloj. Mi ne scias ĉu ĉiuj homoj volos legi mian romanon, sed mi ĝin verkis por ĉiuj. Ĝi koncernas tiel Anglujon kiel Hispanujon, tiel Italujon kiel Francujon aŭ Germanujon, tiel Respublikojn kun sklavoj kiel Imperiojn kun servistoj. La socialaj problemoj transiras la landlimojn; la turmentoj de la tuta Homaro — turmentoj grandegaj, kiuj plenigas la mondon — ne submetiĝas al la limlinioj de la geografiaj kartoj. Kie ajn la viro estas senkultura kaj suferas kaj malesperas; kie ajn la virino sin vendas por ne malsatmorti; kie ajn al infano mankas instruaj libroj kaj bona koro, kiu maldigu lian vivadon, alvenos "La Mizeruloj" ekkriante: "jen! Mi venas helpi vin!"

En la scenejo — ankoraŭ tiom konfuza — de la civilizacio, la mizerulo nomiĝas Homo. La Homo suferas en ĉiuj klimatoj, kaj esprimas sian doloron en ĉiuj lingvoj.

Via Italujo, sinjoro, suferas tian malbonon ne malpli ol nia Francujo; via admirinda Italujo enhavas en sia terosurfaco ĉiun specon de mizeroj. Ĉu la banditismo, kiu ja estas la ekzaltata paŭperismo, ne disvastiĝas terure sur ĝiaj montoj?

Kvankam vi posedas: Romon, Milanon, Palermon, Torinon, Sienon, Pizon, Mantuanon, Bolognon, Feraron, Genovon, Venecion; heroan Historion, sublimajn ruinaĵojn, mirindajn monumentojn kaj belegajn urbojn, vi estas tiom mairiĉaj, kiom ni. Al vi ne mankas admirindaĵoj nek putraĵoj. La suno en Italujo estas belega sendube, sed, ve! la lazuro ne estingas la mizeron de la homoj.

Kiel ni, vi havas sociajn interkonsentojn, superstiĉojn, tiranecojn, fanatikecon kaj blindajn leĝojn, kiuj pligrandigas la malklerecon de la popolo. La sociaj problemoj estas tiom malĝojigaj por vi, kiom por ni. Via popolo mortas iom malpli pro malsato, kaj iom pli pro febro; via higieno ne estas supera al nia. La nuboj de la kontraŭkultura partio, protestantaj en Anglujo, estas katolikaj en Italujo. La arbitra interpreto de la Biblio estas tiom grava, kiom la devio de la spirito de l' Evangelio.

Ĉu mi devas daŭrigi? Ĉu mi devas elmontri ankoraŭ pli konvinke tiun teruran paralelecon? Ĉu ne balanciĝadas antaŭ viaj okuloj, kiel antaŭ la niaj, la abomeninda pesilo kun siaj du teleroj plenaj je paŭperismo kaj paraziteco?

Kie estas via armeo el instruistoj, la unika armeo, kiun la vera civilizacio rekonas? Kie estas viaj liberaj kaj devigaj lernejoj? Ĉu scias legi ĉiuj homoj, en la patrujo de Dante kaj de Mikaelo Angelo?

Ni ekzamenu vian socialan organizon; ni rigardu ĝin tia, kia ĝi estas, kun ĝia evidenta maljusteco; montru al ni viajn virinojn kaj viajn filojn. Ni taksas la civilizacion laŭ la protekto, kiun ĝi donas al tiuj malfortaj kreiĵoj. Ĉu la prostituado ne estas tiel bedaŭrinda en Napolo, kiel en Parizo?

Kiom da vero posedas viaj leĝoj, kiom ĝa justeco devenas de viaj tribunaloj? Ĉu ne turmentas vin, kiel nin, tiuj teruraj vortoj; publika venĝemo, laŭleĝa maljusteco, malliberejoj kaj ekzekutejoj?

Italoj! Beccaria mortis, kaj Farinacio vivas inter vi, kiel inter ni! Ĉu via registaro kuraĝas proklami la identecon inter la moralo kaj la politiko? Ho! Granda popolo de Italujo, kiel vi similas la grandan popolon de Francujo! Ve! Fratoj! Kiel ni, vi ankaŭ estas "mizeruloj"!

El la profunda mallumeco kie ni restas, ni ne vidas la helan lumon de la Edeno belega kaj malproksima.

Resumante kion mi diris: tiu libro — "La Mizeruloj" — estas spegulo de nia malĝojiga situacio, simila al la via. Ekzistas homoj kaj klasoj, kiuj ribelas kontraŭ ĝi, kaj mi scias la kialon: la speguloj montras al ni la veron, pro tio ili estas malamataj, kvankam ili estas utilaj.

Nu, mi verkis la libron por ĉiuj homoj, kun profunda amo al mia lando, sed ne priokupante min pri Francujo pli ol pri ia alia popolo. Iom post iom, maljuniĝante, mi sentas min pli simpla, kaj, pli kaj pli homaramanta.

Plie, tia estas la tendenco de nia epoko, tia estas la logika disvolviĝo de la franca revolucio; kaj, por konformigi sin al la seninterrompa disvastiĝo de la civilizacio, la libroj ne plu povas esti ekskluzive francaj, italaj, germanaj, hispanaj aŭ anglaj. Ekde nun, ili estu tuteŭropaj, kaj super ĉio, tuthomaj.

El tio rezultis nova artplena logiko, kaj aliaj necesaj verksistemoj, kiuj ŝanĝis ĉion, eĉ la kondiĉojn — iam tiom rigidaj — pri gusto kaj stilo, kiuj, kiel ĉio, devas esti perfektigitaj.

Kelkaj francaj kritikistoj diras — kaj mi tre ĝojas pro tio — ke mi estas ekster tio, kion ili nomas la franca "plaĉo". Mi tre dezirus meriti tiun "laŭdon"...

Mi ne multe povas fari, sed la tutmonda sufero turmentas min, kaj mi penadas ĝin mildigi, sed la klopodado de unu sola homo estas nesufiĉa, tial mi petas al ĉiuj: Hejpu min!"

Jen tio, kiom via letero inspiris al mi. Se mi redaktis tiun ĉi respondon iomete patose, tio estas konsekvenco de la jena frazo, kiun vi skribis en via letero: "Kelkaj italoj supozas, ke "La Mizeruloj" estas franca libro, kaj ĝi tute ne rilatas al ni. Estas taŭge, do, ke la francoj legu ĝin kiel historion, sed ni ĝin legas kiel novelon."

Ve! Mi rediras: francoj aŭ italoj, la mizero rilatas al ni ĉiuj. Ekde la unuaj tempoj de la Historio, la mizero estas la ornamo de la tuta mondo. Ni esperu, ke baldaŭ venu la momento, kiam ni povos demeti de ni tiajn ĉifonojn...

Se vi opinias, ke tiu ĉi letero iom klarigos la aferon, publikigu ĝin.

Mi esprimas al vi mian plej altas estimon.

★

## Riceco Devenanta de la argentinaj ebenajoj

La Pampo okupas vastan ebenajon 700 mejloj longan kaj 400 mejloj larĝan. La milda klimato, la bona grundo kaj abundaj pluvoj igas tiun grandan surfacon natura paŝtejo. Sur ĝi kreskas malalta planto nomata "medikago", per kiu oni nutras kaj grasis multnombrajn brutarojn.

Argentino akiras la plimulton de sia riĉeco el la brutaroj. Antaŭe, la plej grava parto de la besto estis la felo, sed hodiaŭ la malvarmigaj ŝipegoj portas glaciigitan viandon el Argentino al ĉiuj lokoj de la mondo. La komerco de la viando postulas fabrikojn, kaj do, oni konstruis multajn en la vastaj havenoj de la bordo, precipe, Bonaero, Rosario kaj Bahia Blanka. Oni eksportas ĉiujare pli ol 1.500 milionojn da kilogramoj da viando, kune kun sebo, feloj kaj laktaj produktoj.

Je la Pampo, proksime de la bordo, oni bredas ŝafinojn, sed la grandegaj kvantoj da lano por la eksportado estas eliritaj el la ŝafaroj el la sekaj, duon-dezertaj patagoniaj regionoj.

La Pampo estas ankaŭ granda produktanto de tritiko, de kies rikolto oni eksportas la duonon. La sakoj de tritiko estas pilitaj, kaj poste ŝargitaj en vagonaroj, kiuj transportas ilin al la havenoj.

Meze de la Pampo, malproksime de bordaj distriktoj, la vojoj estas malbonaj. Je somero, ili estas sekaj kaj polvokovrataj, kaj je vintro, kotaj. Do, estas pli malkare konstrui fervojojn ol vojojn.

Rigardante fervoj-karton, ni povas rimarki la ventumilan formon de la fervoj-reto, kiu finiĝas en la havenoj de Rosario, Bonaero kaj Bahia Blanka.

ENIO HUGO GARROTO  
(Rafaela-Argentino)

★

## JOALHERIA A' JOIA

Joias, Relogios e Objetos para Presente

A. BERNACCHI &amp; CAMANHO

36 — Rua da Carioca — 36

Telefone 22-1415 — Rio de Janeiro

## FRANCISCO PERDIGÃO

Despachante oficial

Prefeitura e Recebedoria

RUA PEDRO I n.º 14 - 2.º andar — Tel. 22-5464

# Rio Esperantista

Orgão oficial da A. E. R. J.

PENSAMENTO E TRABALHO PELA FRATERNIDADE UNIVERSAL

Diretor Nelson Pereira de Souza —

Redator-Chefe László Zinner

Assinaturas:  
Brasil - Cr\$ 15,00  
Exterior - Cr\$ 30,00  
Ou 25 Coupon resposta


Rio de Janeiro, agosto de 1947

ANO I — Edição mensal — N.º 5

Redação e administração  
R. das Marrecas, 19, 2.º and.  
Tel.: 42-5731 — C. P. 3677  
Avulso Cr\$ 1,00

## 104 JARA BRAZILANO LERNAS ESPERANTON

Je la 14, de Julio, sur la brazila ĵurnalo "Diário da Noite" aperis intervjuo pri la kurso, kiun, antaŭ nelonge, Associação Esperantista do Rio de Janeiro inaŭguris ĉe "Centro Democrático de Piedade". La aperinta foto montras la kuraciston



Alfredo Antônio Osório, kiu diplomigis en Parizo, en la jaro 1862<sup>a</sup>. Ankaŭ estas videbla s-ano F. Doblaz Filho, kun lerno-libro en la mano, plenumante la taskon instrui la ĉeestantojn. La kliŝo estas afable donacita de "Diário da Noite", de Rio de Janeiro, al "Rio Esperantista".

### DR. ADOLPHO STAERKE

Livre docente da Universidade do Brasil  
Clínica de senhoras

Residência: RUA BELA S. LUIZ, 68  
Tel. 48-5892

Consultório:  
R. ASSEMBLEIA, 58-1.º  
Tel. 42-3835

### INDUSTRIAS « A CLIT »

Artefatos de: Aclit, Bakelite, Galalite, Polisterine e Metaes

End. Telegráfico: «Aclit» — Rio de Janeiro  
R. BRAULIO CORDEIRO, 189 — Tel. 49-3930

## LEGU

# "RIO ESPERANTISTA"

# LA GAZETO EL RIO POR LA TUTA MONDO

## LERTA KNABO

En la strato Zamenhof, en la ĉefurbo brazila, ekzistas malgranda tajlorejo, kie knabo preskaŭ dektrijara faras sian metilernadon ĉe la tajloro.

La mastro estas bonkora homo, sed lia edzino estas trege avara.

La knabo nomiĝas Joĉjo, kaj li penas lerni la metion, kiun li multe ŝatas.

Iutage, je la tria posttagmeze, ili sidigis ĉe la tablo por lunĉmanĝi. La sinjorino donis al la knabo tason da kafo, kaj panon, sed ne buteron. Tuj poste Joĉjo ekploris; mifrigita, lia estro demandis:

— Kio okazas al vi, knabo? Ĉu vi malsanas? Kio doloras al vi?

Joĉjo respondis: — Mi ploras, ĉar mi ne povas daŭrigi la laboradon ĉe vi.

— Kial? Demandis la tajloro.

— Ĉar mi ekblindiĝas, kaj mi jam ne vidas buteron en la pano.

— Ni ne havas buteron, diras la sinjorino.

— Do vi donu al la knabo pecon da fromaĝo, respondis ŝia edzo.

Ŝi donis al li maldikegan tranĉaĵon da fromaĝo. Joĉjo prenis ĝin kaj metis antaŭ siaj okuloj, dirante kun multa sprito: — Dank! al Dio mi povos daŭre labori, ĉar mi jam vin vidas tra la fromaĝo.

Patrocinado pela Associação Esperantista do Rio de Janeiro, inaugurou-se, dia 21 deste, sob a direção do professor Manuel Aveleza de Sousa, mais um curso elementar da língua da humanidade, que funcionará na sede da Sociedade Teosófica no Rio de Janeiro, à rua do Rosário, 149, sobrado.

O ato inaugural foi presidido pelo Dr. Ivan Galvão, presidente da Loja Pitágoras, que, usando do verbo que lhe é peculiar, proferiu belíssima dissertação, mostrando o alcance do Esperanto.

A seguir, Iolanda Araujo Costa, em síntese admirável, traçou os comuns objetivos da Teosofia e do Esperanto, visando, ambos, a fraternidade humana.

Falaram ainda Nelson Pereira de Souza, em nome da Associação Esperantista do Rio de Janeiro, e, Virgílio Guayanás de Souza, diretor do Departamento de Propaganda da mesma Associação.

Para terminar, e satisfazendo a curiosidade dos alunos inscritos, o Professor Aveleza, servindo-se do quadro negro, demonstrou a facilidade da gramática esperanta, o que muito concorreu para incentivar os presentes no estudo do sonoro idioma internacional.

## NOSSOS CURSOS

A Associação Esperantista do Rio de Janeiro inaugurou a 7 de junho deste ano, no Centro Democrático Progressista de Piedade, mais um curso para o ensino do Esperanto.

A reunião inaugural foi presidida pelo presidente do citado Centro Democrático, que depois de explicar a finalidade do ato concedeu a palavra ao Diretor do Departamento de Ensino da Associação Esperantista, que em magistral discurso disse da finalidade do idioma internacional.

A seguir, fizeram uso da palavra o presidente da Associação Esperantista do Rio de Janeiro, Francisco Doblaz Filho, Délio Pereira de Souza, Otávio Viana Peixoto e Dr. Braz Cosenza, que em rápidos e brilhantes improvisos mostraram o alto valor de uma língua comum a todos os povos, sem o que não se poderá reanizar a legítima fraternidade mundial.

Entretanto, a nota mais interessante da inauguração desse curso de Esperanto, — devendo o acontecido servir de incentivo a muitos moços que desperdiçam o tempo em futilidades — foi quando pediu a palavra um ancião, para, em arroubos de oratória, dizer que também acreditava na alta finalidade do Esperanto.

Concluindo sua fascinante alocução, pediu inscrevéssemos seu nome entre os dos 26 jovens candidatos ao curso, dizendo que, embora naquela idade pouco pudesse fazer em prol do extraordinário idioma, devido ao peso dos seus 104 anos, não poderia permanecer de braços cruzados ante tão nobre empreendimento.

O velho de inteligência moça a que nos referimos é o Dr. Alfredo Antonio Ozório, diplomado em Paris no ano de 1862, médico e íntimo amigo de Pinheiro Machado, e que é, cremos não errar, a primeira pessoa que, em idade tão avançada, vai dedicar-se ao estudo do Esperanto.